


# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報



## JOKOHAMO PLI NOVA (5)

SIBAYAMA Zyun'iti

### Flor-Ekspozicio okazos en 2027! (Kiel iĝos la Eks-Mararmea Tereno)

En p.176 de la “Gvidlibro pri Jokohamo” en 2017 estis skribite: “La Komunikada Instalajo de Kamiseya (上瀬谷)”, ĉ. 240 ha (4-oble de la Tokia Disneyland) redoniĝis (de usona okupado al Japanio) en junio 2015. Publikaj instalaĵoj, enurba agrokulturo k.c. estas planataj.” Ties utiligo en 2027 kiel ejo de la internacia ekspozicio estis lastatempe publikigita.

#### Historiaj konsideroj

Temas pri mararmea instalaĵo de Usono, kiu okupis Japanion en 1945, post la venko de Usono. La tereno mem estis instalaĵo de la Japana Imperia Mararmeo en la tempo de la Dua Mondomilito, t.e. la milito japana-usona.

Japanio estis certe insula lando, kun forta mararmeo, kiu eĉ venkobatis Rusion, kaj Jokohamo estas havenurbo, sed tiu loko Kamiseya distanciĝis de la maro (haveno) je 20 kilometroj. Laŭdire la loko estas vartenejo, terminalo de varkolektado.

Post la japana kapitulaco, famiĝis la armea militobazo en urbo Atugi, kien alvenis la Generalo MacArthur el Usono por regi Japanion. – Cetere lastatempe la usona prezidanto Biden [bajden] surlandiĝis al tiu tereno, vizitinte Japanion. –, kaj tiu tereno Kamiseya, pli proksima al Atugi ol la centro de Jokohamo, estis vice uzita. Poste la loko estis uzita

speciale kiel komunikada centro – oni kredas ke en ĝi oni kaŝaŝkultis diversajn komunikojn aere disirantajn. Nun tiu funkcio estis centrigita en la militobazo de Misawa en Gubernio Aomori.

Post la redono de la tereno al Urbo Jokohamo, la urbo planis kiel utiligi la terenon, kaj unu el la planoj estas inviti Internacian Ĝardenan Ekspozicion (ofte nomatan: Flor-Ekspozicio) en 2027, uzante 100 hektarojn el la areo, inkluzive de aŭtoparkejo. Ĝi estas internacia evento, kiu unuafoje okazis en Oosaka en 1990. Sed kelkaj civitanaj grupoj estas kontraŭ la plano, dirante ke estas absurde rompi nun verdoplenan lokon por fari ekspozicion pri Ĝardenoj.

Cetere la loko estas nun nefacile alirebla de publika transporto, krom iom longa rajdo sur buso. Estis plano etendi gvidrelan transportosistemon de jam ekzistanta fervojo de Sagami-Tetudoo, sed tiu privata kompanio neis la planon pro la financa malfacilo tenadi la transportadon.

#### Ekspozicio aprobata

Je la 28a de novembro 2022, la Buroo de Internacia Ekspozicioj (BIE) agnoskis, ke en 2027 okazu la Internacia Ĝardena Ekspozicio en Jokohamo, nome en la supre skribita loko, de marto ĝis septembro. La urbo antaŭkalkulas viziton de entute 15 milionoj da spektantoj.

## eseo

## Manĝokulturo en Koreio, kiun mi spertis en la kongreso

NAMBA Fumiharu

Lastatempe mi vojaĝis al Busano, Sud-Koreio kaj partoprenis en la 10a Azia-Oceania Esperanto-kongreso. Dum la vojaĝo kaj kongreso, mi spertis multajn aferojn interesajn, amuzajn kaj pripensemajn. Kelkajn el ili, mi prezentu en ĉi tiu eseo pri la manĝoj dum la kongreso, prezentante ankaŭ la manĝokulturon en Koreio.

Kiam mi aliĝis al la kongreso, la LKK akceptis rezervadon de multfojaj manĝoj dum tuta periodo, ekde la vespermanĝo de la unua tago, ĝis la tagmanĝo de la fina tago. Nu... Ĉu ne estas aliaj manĝejoj ĉirkaŭ la kongresejo? Konsiderinte tiun eblecon, mi rezervis ĉiujn tagmanĝojn kaj vespermanĝojn. (Mi tranoktis en alia hotelo ol la kongresejo, tial mi ne mendis la matenmanĝojn sed manĝis en tiu hotelo, Toyoko-Inn.)

Kelkfoje, la kongresanoj ĝuis manĝadojn en la manĝejo 1a-etaĝa de kongresejo. Tie oni ofertis lunĉkestajn kuiradojn. En la kesto estas du grandaj partoj, unu meza parto kaj ses malgrandaj partoj. Ĉefaj manĝaĵoj en grandaj partoj estas rizaĵo kaj viandaĵo. Apude troviĝas salato en meza parto. Krome, en multaj malgrandaj partoj estas kimĉioj, legomoj, kaj aliaj diversaj kuiradoj en malmultaj pecoj.

Jen estas korea lunĉkesto "Dosirak" (korelingve). Verdire, la kvanto de manĝaĵoj en Dosirak estas tro multa por ordinara partoprenantoj en la kongreso (Eĉ por mi kiel tro dika ulo...). Onidire, en korea kulturo oferti troajn manĝaĵojn estas konsiderata kiel estimo



kaj sincereco. Tamen, tiu kutimo malŝparanta manĝaĵojn estas ne bonega en nuntempa epoko...

Kelkfoje, la kongresanoj iris al protestanta preĝejo apud la kongresejo, por manĝo. Kial preĝejo? En la subtera etaĝo de preĝejo estas granda kafeterio, kaj la LKK jam rezervis utiligition por manĝado de la kongresanoj. Iu LKK-ano klarigis, ke la kristanismaj organizoj en Koreio havas multajn anojn kaj monon, tial en preĝejoj ili ofte instalas bonajn manĝejoj malmultekostajn.

Jen estas plado en la kafeterio. Oni povas preni manĝaĵojn laŭ sia volo kaj stomako, tial vanigi manĝaĵojn estis facile eviteble. En grandaj partoj de plado oni surmetas viandaĵon kaj rizaĵon. Krome en la malgrandaj partoj oni aldonas kimĉion, salaton, ktp. Fine oni prenas unu bovlon da supo. Sur la plado estas longa parto por manĝilo, kaj oni metas metalajn manĝbastonetojn (korelingve: jeokkarak) kaj kuleron (korelingve: sukkarak).



En la kongresejo, Oni preparis tablon por kafo kaj manĝeto. LKK-ano klarigis ke, en preskaŭ ĉiuj kongresoj en Koreio la LKK preparas kaj ofertas kafon, fruktojn kaj dolĉaĵojn, senpage por partoprenantoj. Bona kutimo! Mi volas konsili ke ni preparu tion ankaŭ en japanaj kongresoj!

Akvo estis oferita per servilo de mineralakvo. Tamen, kafo estis ne kafmaŝina sed tujpreta. En Koreio, popoloj jam longe kutimiĝas tujpretan kafon "bastonan". En longa malgranda sako oni



pakis sekigitan kafon, kremon kaj sukeron kune. Kvankam tiu “bastona” kafo troviĝas ankaŭ en Japanio, ĝi estas plu kutima kaj populara en Koreio, kvazaŭ tiu bastono estas ĉefa kafo-

kulturo de la lando.

Dum la vojaĝo en Koreio, mi treege ĝuis diversajn koreajn kuiradojn, ne nur en kongresejo sed ankaŭ en stratoj kaj restoracioj.

Tamen, kiam mi revenis al la flughaveno Narita, mi tuj trovis japanstilan manĝejon Yoshinoya, kiu servas gjudonon (bovaĵoj sur rizaĵo en bovlo), kaj rapidege mi eniris kaj mendis ĝin por tagmanĝo.

Ho, la manĝo en Yoshinoya belege kortuŝis min! Ja, mi estas japano, kaj gjudono estas kutima manĝaĵo por mi. (Tamen, dum la manĝo mi volas uzi kuleron sukarak...)

## traduko

# Sufokita kadavro

orig. YUMENO Kyûsaku\* trad. SIBAYAMA Noriko

Estas benko en iu parko.

Tuj antaŭ mi unu linio da akvo el fontano ŝprucas en la lazuran ĉielon vesperan alten alten kaj falas.

Aŭdante la sonon de la fontano, mi dismetas du-tri vesperajn ĵurnalojn. Mi konkludis, ke en ĉiu ĵurnalo ne troviĝas serĉata priskribo, kaj mi rikanante buligis la ĉifitan ĵurnalon.

Mi serĉis la priskribon pri kadavro de kompatinda popolana knabino, kiun mi premsufokis en iu neloĝata domo en ĉirkaŭurbo antaŭ unu monato.

Mi profunde enamiĝis al ŝi. Iun vesperon ŝi venis por renkonti al mi. Tiam ĉar ŝia knabineca hararanĝo (*momoware*) kaj la larĝmanika kimono (*hurisode*) estis tro belaj, mi ne povis elteni sufokemon kaj mi trude portis ŝin al izolita domo apud fervoja transirejo. La surprizitan kaj suspektantan knabinon mi senhezite premsufokis, kaj poste finfine mi sentis delasi grandan ŝarĝon. Se mi ne agus tiel mi freneziĝus...

Mi malzonis ŝian obion kaj kroĉis ĝin al ĉambra lintelo, ŝajnigante kvazaŭ ŝi pendigus sin. Post tio mi reiris al mia

pensiono kun indiferenta mieno. Tamen de tiam ĉiutage, ĉiumatene kaj ĉiuvespere, mi kutime venadas al ĉi tiu parko, kaj sidante sur la benko, legas du-tri matenajn kaj vesperajn ĵurnalojn aĉetitajn ĉe la enirejo.

“Sinpendiga kadavro de knabino kun larĝmanika kimono”

mi atendis tiam titolon. Kaj post certigo, ke nenie troviĝas tia artikolo sur la papero, mi kutimis rikani rigardante lazuran ĉielon super la neloĝata domo.


Nun ja estas tiel. Mi sub la benkon enĵetis la du-tri ĵurnalojn ĉifite buligitajn. Kun cigaredo “Bat” en la buŝo mi retrorigardis la nuban ĉielon. Kaj kiel kutime rikanante mi preskaŭ frotis alumeton, tiam mi momente ĉesis spiron, ĉar mi trovis unu ĵurnalon falantan ĉe miaj piedoj.

Ĝi estis socia paĝo de vespera ĵurnalo de la tago, kiun forlasis ŝajne iu sidinto sur la benko. La trikolona granda raportaĵo staranta en la mezo de la paĝo ensaltis en miajn okulojn kvazaŭ elektro.

## Stranga kadavro en neloĝata domo

En ruina domo apud fervoja transirejo XX duonskeleto pasinta unu monaton post la morto.

Juna viro kun jako ŝajne dungito de kompanio



Kaptinte la artikolon mi freneze elsaltis el la parko. Kaj kiamaniere mi ne sciis sed mi staris ŝtonigite antaŭ la memorinda ruina domo apud fervoja transirejo XX.

Baldaŭ mi rimarkis la ĵurnalon en mia mano, kaj mi rapide rigardis ĉirkaŭon. Observinte, ke neniu pasas, mi kuraĝe malfermis la pordon kaj eniris.

Interne okupis preskaŭ mallumo. Mi atente paŝis al la profunda ok-tatama ĉambro, kie mi pendigis knabinan kadavron, kaj frotis alumeton...

“.....”

... Mi vidis sendube MIAN kadavron.

Alkroĉate zonon al trabo, kun “Bat” en la

buŝo, kun alumeto en la dekstra mano, kun kaptita ĵurnalo en la maldekstra mano...

Pro tro da konsterniĝo mi preskaŭ senkonsciigis. Lasante fali duonbrulantan alumeton mi iom dubis ĉu ĝi estas intrigo de polico. Do en tiu momento neatendite el la mallumo malantaŭ mi aŭdiĝis rido de junulino.

Ĝi certe estis la voĉo de la virino sufokita de mi.

“O ho ho ho ho... Ĉu vi reale sentis mian ĉagrenon?”

---

YUMENO Kyūsaku: japana novelisto (1889-1936)



## OKAZIS

En la 20a de novembro (dimanĉe), inter 13:00 kaj 15:00, ni havis “Hama-Rondan Tagon”, en kiu niaj membroj kunvenis por komuna celo. La tago estas preskaŭ unu jaron kaj duono post la malfermo de la Esperanto-Muzeo Jokohama, kaj ni klarigis, kiel statas nun la muzeo. Al ĝi venis 13 membroj, kaj ĉefe s-ro Doi Hirokaz klarigis, i.a. kiel deĵori kaj akcepti gastojn, kaj kiel klasifiki librojn aŭ aliajn muzeaĵojn kaj katalogi ilin.

## NIAJ PLANOJ

### Jarkunveno en 2023

Nia NPO Esperanto-Jokohamo havos Jarkunvenon en la 29a de januaro, en nia Muzeo. Tio estas la plej supera decidorgano de nia NPO, okazanta unu fojon jare. Ni tiam revuos la agadon en 2022, fiksos planon en 2023, kaj elektos estraranojn.

## Niaj klasoj

\***Eseoj**: gvidas Doi Hirokaz, ĉe la Muzeo, en sabata posttagmezo. Lastatempe oni legis nefikcion “Homoj manĝantaj”, kaj nun legas geografian libron “Lagoj en la mondo”.

\***Jokohama Salono**: sen gvidanto, per Jitsi, en sabato 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton de monato oni legas “Paradizo Ŝtelita” de Trevor Steele. La 2-an sabaton oni interkritikas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni interkritikas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

\***erikoj**: gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en merkredo de 13:30-15:30. Lastatempe oni finlegis japanan novelon “La Pordego” de Nacume Sooseki, tradukitan de Doi Ĉieko. De nun oni legos “Nokto de la Galaksia Fervojo”.

\***Verse**: gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, neregule, unu lernanto. Lastatempe oni eklegis “Viktimoj” de Julio Baghy.

\***Teksanto**: gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo. Nun legata estas “Falantaj Muroj” de Trevor Steele.



## 3ZZZ legis niajn artikolojn

(30a de majo - 28a novembro 2022)

### elsendo de la 30a de majo 2022

el Novaĵoj Tamtamas numero 374; “La ŝtona urbo komune legita” de Sibayama Zyun’iti.

### elsendo de la 14a de novembro 2022

el Novaĵoj Tamtamas numero 378; “Laŭ aĝo, laŭ sekso” de Sibayama Noriko.

### elsendo de la 21a de novembro 2022

el Novaĵoj Tamtamas numero 379; “Surgrimpi la monton” de Mizro Iwaya.